



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

DEZIRESPRIMOJ VOĈDONITAJ en la 3-a Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj en BUDAPEST.

1-a Kunsido (pri pacifismo.)

La Kongreso,

aŭdinte la paroladon de Monsinjoro GIESSWEIN pri la Kristanaj fundamentoj de la paca ideo, kaj la neceseco de partoprenado de la katolikoj en la internacia pac-movado, kaj en ĉiuj gravaj internaciaj movadoj, kiuj havas altan celon, esprimas la deziron:

- 1e. ke la ideo de katolika pacifismo estu studata kaj propagata en la Katolikaj Esperantistaj grupoj kaj societoj;
- 2e. ke ni provu komprenigi al la katolikaj pacifistaj asocioj de niaj landoj la gravecon de Esperanto por la atingo de ilia celo.

Plue, la kongreso esprimas unuanime la deziron, ke en ĉiuj katolikaj movadoj, rilataj al sociala aŭ morala agado, la katolikaj esperantistoj estu ĉiam fervoraj helpantoj.

2-a Kunsido (pri anti-alkoholisme.)

La Kongreso,

aŭdinte la raportojn, de F-no HORNUNG pri la movado

anti-alkoholisma — ĉefe ĉe la katolikoj — en Germanujo; de S-ro Pastro SZUREK pri la movado en Polujo; de S-ro Dekano TELEKESY pri la movado en Hungarujo; de S-ro VESZELYI pri la movado en Hungarujo, kaj konsiderante, ke la alkoholismo estas ne nur grava malbono por la homa saneco kaj digneco, sed ke ankaŭ per ĝi multaj animoj pekas kaj pereas, kaj ke, sekve, la katolikoj devas ĝin kontraŭbatali pro religiaj motivoj per religiaj rimedoj, esprimas la deziron:

ke estu fondataj en ĉiuj landoj katolikaj ligoj por militi kontraŭ alkoholismo; ke oni gajnu la junularon kaj infanaron por ĝin eduki pri alcoholdetenado; ke estu starigataj kiel eble plej multe da konsilejoj kaj kuracejoj por alcoholmalsanuloj, kaj oni fondu ĉie senalkoholajn gastejojn kaj societehojn; fine, ke la diverslandaj katolikaj kontraŭalkoholaj ligoj interrilatiĝu por pli efike kunagado kaj hunchelpado, kaj uzu, por plifaciligi siajn rilatojn, la internacian helplingvon Esperanto.

3-a Kunsido (Interjunulaj rilatoj.)

La Kongreso,

aŭdinte la paroladon de S-ro Cl. COLAS pri la neceseco de internaciaj rilatiĝoj inter junuloj de diversaj landoj por prepari la estontecon kaj plicertigi la atingon de la komunaj religiaj, moralaj, fizikaj kaj socialaj celoj, kaj konsiderante, ke neniam ekzistas pli facila interligilo ol Esperanto; aŭdinte plue la alparolojn de S-ro RICHARDSON, ULM, VESZELYI, MUDIE, HÖRL, Pastro KOSMA, STEIER, KNAAPEN, DOMBROVSKY, pri la sama temo, esprimas la deziron:

- 1e. ke I. K. U. E. kaj ĉiu aparta membro de I. K. U. E. zorgu, per plej praktikaj rimedoj, por konigi kaj enkonduki Esperanton ĉe la gejunularaj katolikaj Asocioj de siaj respektivaj landoj, kaj speciale ĉe la nova naskiĝanta movado de junaj skoltoj;
- 2e. ke estu fondita en la sino de I. K. U. E. Internacia Katolika Esperantista Junulara Asocio.

4-a Kunsido (Unuiĝo de la Eklezioj.)

La Kongreso,

aŭdinte la paroladojn de Riverinda Katekismo KOSMA, de la Rito Grek-hungar-katolika kaj de nia anglikana amiko S-ro Francis LANGFORD JAMES, pri la unuiĝo de la disigitaj Eklezioj al la Sankta Roma Seĝo, esprimas la deziron:

- 1e. ke la katolikoj en ĉiuj landoj preĝu fervore kaj laboru ageme sub la direktado de siaj Ekleziaj Estroj por alproksimigi la reunuiĝon al la Vera Eklezio de Kristo de niaj karaj disigitaj kristanaj fratoj en la tuta mondo por atingi la belan celon de nia I. K. U. E., kies devizo estas: Unu ŝafaro sub unu Paŝtato;
- 2e. ke la katolikaj Esperantistoj, pli fervore ol ĉiuj aliaj, estu sindonaj al tiu idealo.

5-a Kunsido (Defendo de la Eklezio.)

La Kongreso,

aŭdinte la raportojn de S-roj Abato RICHARDSON kaj D-ro RACS pri la defendo de la Sankta Eklezio, kaj konsiderante, ke la klopodoj farataj de la malamikoj de nia fido, kaj ĉefe de la framasonaro estas internaciaj, ke, por ilin efike kontraŭbatali, estas absolute necese, ke la diversnaciaj katolikaj asocioj, kiuj zorgas pri defendo de la Eklezio, interkonatiĝu kaj unuigu siajn fortojn,

ke, por tiu interkonatiĝo kaj unuiĝo, Esperanto estas plej utila kaj eĉ necesa instrumento, kiel sukcesplena kaj longa spertado jam montris, esprimas la deziron:

- 1e. ke ĉiuj defend-asocioj, aŭ ligoj, uzu la internacian helplingvon Esperanto;
- 2e. ke la katolikoj Esperantistaj, estu ĉiam pretaj ĉu aparte ĉu grupe, helpadi al la diritaj asocioj.

ALIAJ DEZIRESPRIMOJ AŬ DECIDOJ:

Rilate al la Eŭkaristia Kongreso en Wien.

La Kongreso decidas sendi Oficialan Delegiton al la Eŭkaristia Kongreso en Wien, kaj petas Monsinjonon GIESSWEIN saluti ĝianome la Kongreson.

Rilate al la venonta Kongreso.

La Kongreso,

aŭdinte la proponon de S-ro COLAS, sekretario, kaj la

rimarkojn de S-ro Pastro BIANCHINI kaj de diverslandaj kongresanoj, esprimas la deziron, ke la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista faru, en la komenco de Septembro 1913 (antaŭ la ĝenerala Kongreso de Esperanto) Internacian Katolikan Pilgrimon en Romo, dum kiu okazos la kunvenoj de la 4-a Kongreso. Ĝi invitas ĉiujn katolikojn Esperantistajn ne nur partopreni, sed varbi partoprenantojn al tiu Pilgrimo, kiu estos elmontrado de nia plena kaj forta aliĝo al la kàtolika Eklezio, kaj de nia amo kaj submetiĝo al la Vikario de Jesu-Kristo.

La Kongreso konsentas, ke S-ro COLAS faros preparan laboron kaj petas Pastron BIANCHINI sin okupi pri la sama celo, alvokante la konsilon kaj helpon de Monsinjoro GIAMBENE en Romo, por la efektivigo de tiu deziro.

Rilate al la praktika organizado kaj utiligado de I. K. U. E.

La Kongreso esprimas la deziron, ke en ĉiuj urboj de l' mondo, kie estas membroj de I. K. U. E., estu elektata inter ili unu I. K. U. E.ano, estiminda kaj bone konata Esperanton, por doni al la katolikaj Esperantistoj, membroj de nia Unuiĝo, ĉiujn praktikajn kaj aliajn sciigojn, kiujn ili bezonas. La servojn de tiuj delegitoj oni povos efike uzi por la defendo de la Eklezio kaj denunco de la anti-katolikaj kalumnioj kaj atakoj.

Rilate al la financa stato kaj al la dokumentaro de I. K. U. E.

La Kongreso, aŭdinte la raporton de S-ro KNAAPEN, ĝenerala sekretario de I. K. U. E., rememoras, ke estas nepra devo por ĉiu nacia sekcio de la Unuiĝo akurate pagi la fiksitajn kotizaĵojn, kaj decidas:

- 1e. ke tiu pago devos komenci kun la jaro 1911 por la la tiam aliĝintaj sekcioj;
- 2e. ke nur la unuiĝoj aŭ ligoj, kiuj ĝustatempe pagis la jaran kotizon, estos rigardataj kiel membroj de I. K. U. E.;
- 3e. ke la protokolaro de nia *Unua* Kongreso en Pariso same kiel la protokolaro de nia *Dua* en Hago estu

kiel eble plej baldaŭ transdonataj al la sekretario ĝenerala de I. K. U. E., kiu ilin zorge konservos kune kun la protokolaro de Nia Tria en Budapest kaj ĉiuj aliaj dokumentoj koncerne I. K. U. E.

Rilate al la standardo de la Unuiĝo.

La Kongreso, aŭdinte la proponon de S-ro Anthonioz, petas, ke la pinto, kiu surestas ĉe la ekstremo de l' portilo de la Oficiala standardo de la Unuiĝo, estu anstataŭita de kruco.

La Ĝenerala Sekretario de la Kongreso,
Claudius COLAS.

Je nia granda bedaŭro ni ne ankoraŭ ricevis la manuskripton de la Oficiala Raporto de „Nia Tria”.

La Redakcio.

MIA VOJAĜO AL „NIA TRIA”.

Jam tuj post „Nia Dua”, mi pripensis la partoprenon de Nia Tria. Komence mi opiniis, ke ni Nederlandanoj irus karavane Budapeston, ĉar la animo en Hago estis neesprimebla. Mi mem ne havis la certecon, ke iri mi povus. Ĉu la kongreso okazus dum mia libertempo? Ĉu mi havus sufiĉe da mono? Ĉu mi havus kunvojaĝantojn? Sed la bona Dio helpis min. La du unuaj punktoj estis jam solvitaj du monatojn antaŭ la kongreso. Restis nur la tria. Mi komencis korespondadon kun ĉiuj Nederlandanoj pri kiuj mi povis esperi, ke eble ili partoprenus la kongreson. Sed ĉiam la saman respondon mi ricevis: „mi ne iros” aŭ „ne scias ankoraŭ ĉu mi eblos iri Budapeston”. Kion fari? Estis fiksita, ke mi iros, sed mi preferis vojaĝon kune kun samideanoj super vojaĝo tute sola. Bonan ideon donis al mi Dio. La Francoj, kiuj tiel grandnombre ĉeestis en Hago, certe iros al Hungarujo, do, demandu, ĉu vi povos kuniri kun ili. Kaj mi sukcesis. Du fraŭlinoj francaj volonte akceptis mian proponon. La 14-an de aŭgusto mi forvojaĝis Parizon tute sola. Ne vidinte mian amikinson, mi forlasis

la stacidomon kaj do staris en Parizo, la lum-urbo, pri kiu mi tiel multe aŭdis, sed kiun mi ĝis nun neniam vidis. La urbo estas belega kaj grandega, sed tempon por sonĝi pri tio mi ne havis. Tuj venis al mi viro por demandi kien mi devis iri kaj ĉu li povus porti mian pakaĵon; li kondukis min al la subtera fervojo kaj poste al la domo de mia kara amikino. Ŝi mem estis ankoraŭ nealveninta, sed ŝia amikino ricevis min kore. Mi demetis mantelon kaj ĉapelon, lavis min kaj estis denove freŝa. Ni kune vespermanĝis laŭ franca kutimo. Mi havis sufiĉe por pririgardi, ĉar estis tute nekonata al mi la francaj kutimoj. Poste mi enlitiĝis kaj tuj mi plu nenion sciis pri la tuta mondo. La 15-an jam frue ni iris al la preĝejo, ĉar estis la festotago de l' Dipatrino. Al ŝi ni rekomendis nin, por ke ŝi protektu nin dum nia granda vojaĝo. La vagonaro, per kiu ni volis foriri, ne estis enirebla por ni. Nun ni devis atendi kelkajn horojn. Mia gastigistino proponis, ke mi iru viziti kun ŝi kelkajn vidindaĵojn; ŝia franca amikino restus en la stacidomo por gardi la pakaĵojn. Ni vizitis la grandan preĝejon de „Montmartre”, belegan konstruaĵon, en kiu estis multaj fremduloj kiel en tuta la urbo. Ankaŭ ni vizitis la katedralan preĝejon kaj la malliberejon de l' sankta Ludoviko. Tro baldaŭ ni devis reiri al la stacidomo. La vagonaro nun portis nin al Straatsburg. La vojaĝo de urbo al urbo estis plej interesa inter Saarburg kaj Zabern. Post nia alveno en franca hotelo ni faris promenadon tra la urbo. La sekvontan matenon ni iris al la katedralo por aŭdi sanktan Meson. Post la skribado de kelkaj kartoj ni forvojaĝis al Munĥeno. Preterpasinta Kehl ni vidis la montaron kun multe da belaj kaj belegaj vilaĝoj kaj urboj, inter kiuj eble estas plej belaj Bietigheim, Stuttgart, Geislingen kaj Insbrück. La matena alveno igis nin serĉi preĝejon por fari nian matenpreĝon. Poste ni vizitis ankoraŭ du aliajn preĝejojn; belegan kripton, en kiu estas krucvojo ekzistante el belegaj grupoj, diversajn pordegojn kaj la justiĉan palacon. Je la dekunua kaj duono ni forvojaĝis al Vieno. La doganaj oficistoj vizitis nin en Salzburg je la duono de la tria matene. Salzburg kuŝas belege je la deklivo de l' montaro. La staci-

domoj en Aŭstrujo havas ĉiuj belegan aspekton per la peronoj verdaj. Ĉe Amstettet ni havis belan rigardon al la Danubo. La 17-an je la sepa kaj duono matene ni alvenis en Vieno. Ĉi tie ni vizitis ankaŭ diversajn belegajn preĝejojn. Trame ni trairis la urbon. La imperiestra palaco „Schönbrun” vere estas belega. La gardisto klarigis al ni diversajn pentraĵojn kaj diris al ni la nomojn de ĉiuj ĉambroj kaj ĉambregoj. La ĝardeno, kiu ĉirkaŭas la palacon, estas unike bela. Reveninte en la urbo ni ĉeestis paradon de l’ soldatoj kaj aŭdis la nacian himnon. Je la deka kaj duono ni denove envagonaris por iri Budapeston. Dufoje ni devis ŝangi je vagonaro. Je la kvina matene ni havis belan vidaĵon al la Danubo meze de l’ montoj. La 18-an de aŭgusto je la sepa kaj duono matene ni alvenis en la kongresurbo. Ĉar ni ne vidis esperantiston, ni devis nun mem serĉi la vojon. Ni prenis veturilon sed ho ve....., la konduktoro ne povis kompreni nin! Li nur parolas la hungaran lingvon. Ni montris al li adreson kaj li portis nin tien. Neniu estis ankoraŭ tie, do ni montris al li alian adreson, sed nun de l’ monaĥinejo, en kiu la fraŭlinoj havus sian hejmon. Tie ĉi oni ne sciis, ĉu ni triope povus resti; tial ni veturis al la akceptejo. La prelata moŝto, kiu nin akceptis, diris, ke ni povus fari nenion pli bone ol reiri al la monaĥinejo. Tiel okazis. Nun oni akceptis nin, kondukis nin en niaj ĉambroj kaj preparis por ni matenmanĝon. La sanktan Meson ni aŭdis en la akceptejo. Posttagmeze okazis kunveno por preparoli la kongreson. Pri la kunvenoj mi nenion volas diri. Estas multaj personoj pli kapablaj ol mi, kiuj tiujn povas priskribi. Post la kunveno ni promenadis al la monto de l’ sankta Gerhardo. La kongresistoj disiris kaj mi vizitis la belegan insulon de l’ sankta Margareta. Tie mi aŭdis belegan muzikon de l’ soldatoj. De tiu loko vespere la urbo prezentas vere unikan aspekton. Ĉie oni vidas belegajn konstruaĵojn, lumigitajn per elektra lumo; ĉio brilegas. Tia grandiozeco ne estas priskribebla. Mute oni ĝuas de tio; estus peko rompi la silenton de l’ naturo. La sekvintan tagon, frumatene ni iris al la universitata preĝejo. Poste ni havis malfermkunsidon. Dum tiu tago mi

vizitis unu el la urbaj arbaretoj kaj la ĉefajn stratojn de l' urbo. La 20-an okazis granda procesio de l' sankta Stefano, en kiu la kongresanoj de Nia Tria partoprenis. Multe da belegaj kostumoj kavaliraj kaj kamparanaj ni povis admiri. Alveninte ĉe la Stefanopreĝejo ni ĉeestis Meson sub la blanka ĉielo. Poste mi vizitis la nacian muzeon tre, tre interesan. Mi vidis tiel multe, ke estas neeble al mi ion detale priskribi, sed mi ne povas kredi, ke iu popolo havas nacian muzeon pli interesa ol la hungara. La parlamenta palaco estas ekstere kaj intere tre luksa. Sajnas al mi, ke por la Budapeŝtanoj la marmoro estas nevalora, ĉar ĉiam kaj ĉie oni vidas tiun materialon en ĉiuj konstruaĵoj. La katedrala preĝejo estas grandioza. Neniam ankaŭ mi aŭdis tielan muzikon, kiel dum la ĉefmeso en tiu preĝejo. Ŝipe mi vizitis denove la insulon, kie ni havis kumunan vespermanĝon. Mi bedaŭris, ke la tempo tiel rapide forflugis. La 21-an alportis al ni unue: sanktan Meson laŭ greka rito. Estas multe da ceremonioj. Kompreneble tia Meso ne povas okazi ĉiutage. La evangelion oni legis en esperanta lingvo, kiel ankaŭ la sinjoran preĝon. La kunveno de tiu ĉi mateno okazis en la kolegio de monsinjoro Giesswein. Post nia kunveno ni iris al la malferm-kunsido de l' hungara kongreso de esperantistoj. Estis en ĉambrego de l' nacia muzeo. Mi bedaŭradis, ke neniam oni povis komenci je la tempo fiksita, ĉar ni fremduloj volis uzi nian tempon por vidi kiel eble plej multe de Budapeŝto. Dum tiu tago estis vizititaj ankoraŭ la zoologia ĝardeno kaj la florigardeno. Ni vespermanĝis en la urba arbareto kaj povis samtempe ĝui belan koncerton. Tiel forflugis ankaŭ la merkredo. Jaŭdon pastro Parker predikis post la Meso en la akceptejo, por doni ankaŭ ion al niaj animoj. Tuj post la fino mi foriris por viziti la reĝan palacon. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi estas ankoraŭ pli belega ol tiu en Vieno. La muzeo de l' mortigita reĝino Elisabeto estas interesa. Ni vizitis ankaŭ la relikvion de l' sankta Stefano, kiu estas vizitebla dum unu semajno post Lia festo. De tie ni iris al la artkultura muzeo; granda kaj belega, ĝi estis inda viziti ĝin. Posttagmeze oni ludis esperantan teatraĵon. Tamen la

tumulto en la ĉambrego malhelpis la komprenadon. Flugrapide ni vizitis poste la grandan bazaron, ornamita je multe da steloj verdaj. La kumuna manĝado en la restoracio de l' parlamento estis bonega. Poste ni disiris en la urbo. Mi vizitis multe da grandaj vendejoj por aĉeti memoraĵojn. La 23-an matene okazis la fermkursido. Oni fiksis, ke posttagmeze okazos ekskurso al la elrigardturo de Elisabeto. Estis belega kaj saniga ekskurso. Multfoje ni povis ĝui belegon panoramon de l' urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Dum la vespermanĝo ni adiaŭis unu la alian, ĉar la sekvontan tagon estis forironta la pli granda parto de la kongresanoj. Jam je la sesa matene la vagonaro forportis nin al Esztergom, tipa hungara vilaĝo kun belega katedrala preĝejo. La junuloj esperantistaj kondukis nin kaj donis klarigojn. De ĉi tie ni forvojaĝis al Vieno, kie ni adiaŭis ĉiujn, por triope komenci la returnvojaĝon Parizon, kiel ankaŭ ni estis alvenintaj. Tuj post nia alveno ni do foriris al Insbrück, kie ni alvenis la 25-an je la sepa kaj duono matene. La montaro tie ĉi estas tre alta kaj vere belega. Ĉie oni vidis pentrindajn domojn aŭ vilaĝojn, riveretojn kaj arbarojn. Insbrück mem estas bela urbo, ĉirkaŭita de altaj montoj. De Innsbrück al Bregenz oni trairis la plej belan parton de Tirolo. Ĉiam novaj kaj ĉiam belegaj surprizoj. Ni trairis tunelon de dek minutoj fervojveturante. De Bregenz ni veturis al Lindau kaj Frederikshaven, de tie ŝipe al Constanz. Antaŭ nia alveno jam vesperiĝis. La lumoj de la urbo, viditaj de la lago, vin pensigas al sorĉpalaco. En Constanz ni restis ĝis la sekvonta tago. Ni tramarŝis la urbon por enŝipiĝi al Schaffhausen. Tie ni prenis la vagonaron al Neuhausen por viziti la akvofalon, kiun ne sufiĉe ni povis admiri. Tre facile oni ja povus resti tie tutan tagon, por vidi kaj aŭdi la faladon de l' akvo. De Neuhausen ni foriris al Bazel kaj tuj de Bazel al Parizo. En tiu ĉi urbo mi restis ankoraŭ du tagojn, dank al mia patrina amikino. Ni kune vizitis la plej konatajn konstruaĵojn, kiel la muzeon „Louvre”, la palacon de la Invalidoj, la preĝejon de l' sankta Magdalena, la arkaĵo de l' triumfo. k. t. p. Ni trapaŝis la grandegajn vendejojn kaj mi aĉetis

diversajn aferojn, kiuj en mia naskurbo estas multe pli karaj. Sed la tempo de foriro alvenis kaj tro baldaŭ mi devis iri hejmen, ĉar mia libertempo estis finonta tuj. Tial mi forlasis miajn amikinojn, esperante ke mi revidu ilin la sekvontan jaron en Romo kune kun multaj partoprenintoj de Nia Tria kaj de Nia Dua. Tion donu al mi la bona Dio.

F-ino FRANC. V. AMELSFORT.
Tilburg.

(El „*Nederlanda Katoliko.*”)

LA PRAKTIKA SERVO DE ESPERANTO ĈE LA MILITO KONTRAŬ LA „BLANKA SKLAVECO”.

Por helpi iun ajn internacian movadon, Esperanto, la internacia lingvo, estas rimedo multvalora. Diru ni ke, sen internacia lingvo, estas tute ne eble havigi frukto-plenajn rezultojn ĉe movado, kiu bezonas konstantajn interrilatojn inter diverslandanoj. Neniu nacia lingvo povas ludi tiun rolon, jen la verdikto de la sperto, sed la sama sperto almontras, ke Esperanto perfekte taŭgas por tio.

La celo de tiu-ĉi artikolo estas almontri la mirindan helpon, kiun Esperanto povus doni al tiu sankta, nobla milito, kiu unuigas la honestulojn, la moralemulojn, la kompatemulojn de ĉiu civilizita lando kontraŭ tiu malinda komercaĉo, kiu celas per ĉiuspecoj da trompaĵoj kaj perfidaĵoj havigi virinojn, precipe junulinojn, kaj liveri ilin al sklaveco pli terura ol la morto mem.

Por la honoro de la homaro ni ĝoje konfesas, ke tiu nobla milito havas anojn inter la rangoj de diversaj religianoj kaj eĉ de ne-kreduloj, sed estas evidente, ke ni, kristanoj, ni katolikoj, devas ĉiam esti ĉe la antaŭposteno de tiu nobla homema armeo.

Mi havas la honoron esti membro de la komitato de la Belga Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco (angle: „White

Slavery”). Nia Ligo ŝuldas sian fondon al la iniciato de tiu bona agema propagandisto S-ro A. COOTE, la ĝenerala sekretario de la angla Ligo „against White Slavery”.

Tiu inda sinjoro alvenis Bruselon je 1907 kaj sukcesis kunvenigi 25 personojn influajn, katolikajn kaj ne-katolikajn, kiuj fondis nian Belgan Ligon, kiu sufiĉe bone progresas. La internacia „Konferencio” okazis tiun-ĉi jaron en Bruselo de la 21-a ĝis la 24-a de Oktobro kaj prepara kunveno de nia Belga Ligo okazis je la 10-a de Oktobro ĉe S-ro VALENTIN BRIFAUT, la agema sekretario, viro tute sindona al multaj bonfaraj societoj. Unu celo de tiu prepara kunveno estis, proponi deziresprimojn prezentotajn al la Internacia Konferenco.

Antaŭ sciigi mian personan proponon, kelkaj klarigoj estas nepre necesaj.

En la laboro de nia movado ni konstatas, ke afero tre grava estas trovi la rimedon, por averti oportune kaj ĝustatempe la malfeliĉajn virinojn, kaj malhelpi, ke ili falu inter la manoj de la fi-komercistoj, kiuj altiras ilin al la morala ruinigo. Tion celante, oni ofte klopodas interrilati telegrame aŭ letere kun la diverslandaj policianoj. Por sukcesi estas necese, ne perdi eĉ unu momenton, sed la terura lingva malfacilaĵo ĉeestas ĉiam. Estas grava eraro pensi, ke telegramo aŭ letero, france verkita, estas komprenata ĉe la policianoj de ĉiu lando. De la „Préfecture de Police” de Parizo ni sciigis, ke ĉe multaj, multegaj policoficejoj eĉ en grandaj urboj, ne ekzistas eĉ unu policano, kiu povas paroli aŭ korespondi per alia lingvo krom per sia patralingvo. Plue, pro la manko de interrilatoj inter la diverslandaj policianoj, estas tute neeble antaŭscii, ĉu en tiu aŭ tiu-ĉi urbo la policianoj komprenas unu aŭ alian fremdan lingvon, aŭ per kiu lingvo. krom la nacia oni povas interrilati kun ili.

La rezulto de tiu bedaŭrinda fakto estas terura perdo de tempo, kiam oni devus interrilati kun fremdaj landoj.

Sed, de post du jaroj en la „Préfecture de Police” de Parizo, la centro de tiom da progresemaĵoj, kie formiĝis viroj kiel S-ro LAPINE, S-ro BERTILLON k. t. p., fond-

iĝis internacia asocio, kies celo estas precize venki la malfacilaĵojn, kiujn ni bedaŭris. La celo de tiu internacia klubo de la tutmonda Policaro estas, starigi konstantajn, ĉiutagajn interrilatojn inter la policanoj de ĉiu lando en la civilizita mondo. S-ro E. TISON, la prezidanto de tiu klubo, havas tiun ĉi admirindan koncepton pri la Policanaro: laŭ li „ĝi ne estas nur nacia instituto; ne, la tutmonda Policanaro estas antaŭ ĉio internacia Asocio starigita de la civilizacio, por protekti la homan Societon kontraŭ la malbonuloj”. Granda, homema ideo, inda de la nobla franca nacio. Se tiu idealo estus atingebla, kia potenco por la bono estus la internacia policaro! Kiom da katastrofoj oni povus malhelpi! Idealto malfacile atingebla, vi diros. Sed viroj, tiel kiel S-ro TISON kaj liaj francaj amikoj, ne estas haltigataj per malfacilaĵo. De post du jaroj polica klubo Esperantista havas sian sidejon en la Préfecture de la Police de Paris. Ĝia progreso kaj ĝia nuna stato estas nur antaŭvido de la mirindaj servoj, kiujn ĝi faros al la Societo.

Mi do skribis al S-ro TISON leteron, en kiu mi faris al li kelkajn demandojn. Mi celis sciiĝi, ĝis kiu grado li opinias, ke lia internacia Esperanta Klubto povus helpi nian militon kontraŭ la „Blanka Sklaveco”. Mi aldonis al tiu artikolo la esperantan tradukon de la franca letero, kiun mi legis dum la kunveno de la Belga Ligo kontraŭ la „Blanka Sklaveco”.

Sed antaŭ tiu legado mi vizitis ĉe la Ministrejo de la Justeco S-ron GONNES, Directeur général au Ministère de la Justice, por klarigi al li mian proponon kaj submeti ĝin al lia aprobo.

S-ro GONNES, la plej grava aŭtoritato en Belgujo pri policaferoj, aŭskultis min atentege, kaj tre interesiĝis pri la laboro de S-ro TISON, kiun tamen li konfesis ĝis nun plene nescii. Li kore aprobis mian intencon kaj promesis dum la kunveno, kiun li intencis ĉeesti, diri kelkajn simpatiajn vortojn pri mia propono.

Do, post la legado de la letero de S-ro TISON, mi proponis al la kunveno la sekvantan deziresprimon:

Pastro Austin RICHARDSON, membro de la Komitato, esprimas

la deziron, ke stariĝu pli intimaj kaj pli konstantaj rilatoj inter la membroj de la polico de diversaj landoj.

Por malhelpi la hontinda „*traite des blanches*”, preskaŭ ĉiam estas necese agado tre rapida. La plej malgranda tempoperdo en la komunikoj faritaj al la polico preskaŭ ĉiam efikas, ke la persono, kiun oni deziras averti, jam estas inter la manoj de la perantoj, antaŭ ol la polico de la loko estu povinta agadi.

P-ro RICHARDSON do esprimas la deziron, ke stariĝu *konstantaj* rilatoj inter la policianoj de ĉiuj landoj per societoj internaciaj, eksklusive por membroj de la polico.

Tia *Club International* jam ekzistas en Parizo. Prezidanto estas S-ro E. TISON, inspektoro de la polico. La klubo celas konstante interkorespondi kun la membroj, ĉiuj policianoj, loĝantoj en diversaj landoj. Tiu korespondo estas farata en diversaj lingvoj naciaj kaj ankaŭ en la lingvo internacia Esperanto, kiun ĉiuj policianoj de ĉiuj nacioj lernas treege facile.

P-ro RICHARDSON ankaŭ esprimas la deziron, ke pliiĝu konstante la rilatoj internaciaj inter la membroj de la polico de ĉiuj landoj; ke stariĝu listo kiel eble plej kompleta, de la membroj de la polico, kiuj scias korespondi aŭ paroli diversajn lingvojn, montrante kiuj estas tiuj lingvoj. Tia listo havus grandegan utilecon. En okazo de bezono oni povos sciigi pri la lingvoj komprenataj de la policianoj en urbo, al kiu oni devus sin turni. S-ro E. TISON, inspektoro de la polico certigas, ke estas grava eraro opinii, ke sufiĉas skribi aŭ telegrafi franclingve, por esti komprenata en kiu ajn policoficejo. En multaj urboj de Eŭropo loĝas ne unu membro de la polico, kiu komprenas la frankan lingvon. En aliaj urboj ne unu membro de la polico povas skribi aŭ paroli alian lingvon krom sian gepatran lingvon.

Pro la manko de tempo oni ne longe pridiskutis la demandon, sed oni unuanime petis la sekretarion, akcepti mian deziresprimon, kaj prezenti ĝin sub formo, iom pli mallonga, al la estonta „Internacia Konferenco”. La nura celo de tiu-ĉi artikolo estas prezenti al niaj legantoj ekzemplon de la maniero, per kiu oni povas labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiu internacia movado.

Ne nur por la protekto de la junulinoj, sed por la internacieco de ĉiu katolika societo, Esperanto estas utilega kaj eĉ nepre necesa. Pli kaj pli la Katolikoj de la tuta mondo devus plimultigi reciprokajn interrilatojn. Rajte kaj

ideale la Katolikaro estas unu granda familio, sed, pro la lingva barilo, ĝi estas, je la vidpunkto de mond-familio, familio da mutuloj sen komuna familia lingvo. Je la momento, kiam la Katolikaro posedos unu komunan lingvon, kiam ĉiu katoliko povos per Esperanto interrilati buŝe, kaj skribe, kun ĉiu alia katoliko, ni estos nevenkeblaj, ni estos la plej granda potenco sur la tero. Niaj malamikoj, almenaŭ la plej lertaj, bone antaŭvidas tion kaj pro tio klopodas ĉiamaniere dividi niajn fortojn. Ĉiu malamiko de Esperanto estas, volonte aŭ nevolonte, la malamiko de la katolika triumfo. Penadu ni por komprenigi tion al ĉiuj katolikoj, al pastroj kaj al laikoj.

Mi nun aldonas la leteron de S-ro TISON, respondante al mia demandaro. Tiun leteron mi aldonis al la Raporto de la Belga Sekcio de la Internacia Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco kun miaj deziresprimoj.

Austin RICHARDSON.

Aldono I-a.

Préfecture de Police.

PARIS, 9 Oktobro 1912.

Kara Samideano,

Vian tre interesan leteron mi hodiaŭ ricevis, kaj mi rapidis respondi, vin dankante, precipe tial ke vi bonvolis fari alvokon al mia kompetenco, kaj al mia esperantista koro.

Do, mi respondos al tiuj demandoj, kiuj povus interesi la Belgan Komitaton de la „Défense contre la Traite des Blanches”. En via letero vi demandis:

1e. „Ĉu, laŭ via sperto, la franca lingvo sufiĉas por averti, telegrame, aŭ letere, la fremdan Policanaron?”

Bedaŭrinde nia kara franca lingvo ne sufiĉas por polica korespondado. Tiu fakto estas elpruvita al ni per niaj korespondantoj esperantistaj, el kiuj la granda plimulto konfesas, ke ili *tute* ne scias la francan lingvon.

2e. „Kion faras la franca Polico, kiam ĝi devas averti la Policon fremdan pri la agado de krimuloj aŭ suspektuloj?”

Kiam ni devas averti la fremdajn Policanojn pri la „Blanka Sklaveco”, ni sendas la informojn pere la polica administrado. Tio, ne diskuteble, necesigas tro longan tempon.

3e. „Ĉu, laŭ via sperto, fremdaj policianoj ĝenerale scias paroli aŭ korespondi france?”

Kelkaj fremdaj policianoj korespondas france, aliaj korespondas per siaj propraj lingvoj.

4e. „Kun kiom da diversaj nacioj korespondas via Polica Esperantista Klubo?”

La Asocio Internacia Esperantista, kies sidejo estas ĉe la „Préfecture de Police, Paris”, posedas jam 150 membrojn, el diversaj fremdaj landoj, ĉiuj *nun* funkciantaj. Ni interrilatas profesie per la korespondado kaj per nia speciala polica organo „Internacia Polica Bulteno” kun kamaradoj en la sekvantoj lokoj:

Germanlando: Dresden, Chemnitz, Kiel. Anglujo: London, Manchester, Bolton. Svedujo: Stockholm, Gefle, Esklistuna, Lulex. Hispanlando: Madrid, Bilbao, Soria, Geron. Irlando: Dublin, Usono: New-York. Aŭstrio: Franzendorf. Serbujo: Belgrado. Italujo: Genova. Belgujo: Antverpeno. Nederlando: La Hago, Haarlem kaj 's Hertogenbosch.

En kvin el tiuj ĉi landoj ekzistas jam Polica Esperantista Klubo. Ni ankaŭ bone scias, ke en multaj aliaj landoj ekzistas, tie ĉi kaj tie, policianoj, kiuj scias esperanton. Inter la Policestroj, kiuj kore simpatias al nia movado, mi ŝatas citi nian simpatian, genian, kaj mondfaman Polica Prefekton, S-ron Lépine; S-ron Këttieg, ĉefestron de la Polico de Dresden; S-ron Fernandes Llano, ĉefestron de Madrid k. t. p.

5e. „Ĉu vi opinias, ke Esperanto prezentas praktikan rimedon por certigi interrilatojn inter diversaj landoj?”

Ni estas certaj, ke Esperanto admirinde taŭgas por iu ajn organizado de la Policanaro internacia. Ekzemple mi, antaŭ ne longe, tradukis esperante la „Portrait parlé”, parolata portreto, verkon de la mondkonata Antropologisto S-ro Bertillon, kiu bonvolis doni al mi sian permeson tion fari; mia traduko aperis en mia Polica Bulteno, kaj fremdaj kamaradoj ne sciantaj la francan lingvon sciigis al mi, ke ili tute komprenis mian tradukon kaj ke ili povos, okazo donita, utiligi ĝin por policaĵaj aferoj. Dank’ al tiu ĉi nova rimedo, iu ajn krimulo povus esti rekonata per priskribo, esperante verkita kaj sendita senpere al iu ajn policano scianta Esperanton.

6e. „Supozante, ke oni sciigus al vi, ke juna virino, trompita de unu el tiuj komercaĉistoj, estus pasonta, ĉu per la vagonaro, ĉu per ŝipo, tra iuj urboj, kaj fine estus trairona iun urbon nomatan, ĉu vi opinias ke, se en unu aŭ alia de tiuj urboj loĝas membro de via Esperantista Klubo, estus pli facile avertigi la junan virinon

„in transitu”, dum ŝia vojaĝo aŭ almenaŭ averti la policianojn de la urbo, kiun ŝi devus fine trafi, kaj tiel malhelpi, ke ŝi falu inter la manoj de tiu krimulo?”

Sendube, iu ajn Policano, Esperante kaj senpere avertita, pri la traĵiro de tia malfeliĉulino, povus, sen iu perdo de tempo, uzadi malhelpan, anticipantan rimedon por savi ŝin.

Eble oni povus jam havigi korespondantojn en la mondo, elektante en la diverslandaj policoj membrojn sciantajn Esperanton; cetere nia Internacia Bulteno, ĝis nun nur privata polica organo, povus servi al tia entrepreno. Por tio estas necese havigi la permeson de la diversaj registaroj, iun monhelpon kaj la inviton de la Policestraro al ĝiaj subuloj lerni Esperanton por havi en multaj lokoj korespondantojn al la internacia polica organo, kiu tiumaniere iĝos gravega helpilo por la defendo de la Societo kontraŭ la internacia krimularo. Ĝi estus utilega en tiu homema milito kontraŭ „la blanka sklaveco.”

7. „Ĉu vi havas kelkajn proponojn por prezenti al la proksima mondkongreso de la Ligo kontraŭ la blanka Sklaveco, kiu devas kunveni en Londono en 1913?”

Laŭ mi, la temo estas tiel vasta pro la diverseco de la cirkonstancoj, (aĝo, dubo, voleco, aŭ ne voleco de la viktimoj k. t. p.) ke ne estas eble per simpla letero respondi al tiu demando hodiaŭ.

Altestime Via,

E. TISON,

Inspecteur de la Police à la Préfecture de Police.

Paris.

Aldono II-a.

Paroloj de S-ro Lépine, prefekto de la polico en Parizo, dum la internacia konferenco de la Ligo kontraŭ la Blanka Sklaveco:

„Sendube ni neniam plene elradikigos la malvirton, tamen ni devas almenaŭ labori por malhelpi, ke ĝi faru malkulpajn viktimojn. La Ŝtato devas ludi grandan rolon en tiu laboro kaj mi bedaŭras, ke, almenaŭ ĉe la plimulto da grandaj landoj, ĝi ne estas morala, kaj eĉ religia. Jes, gesinjoroj, mi aldonas: **kaj — eĉ — religia.** (Tie ĉi S-ro LEPINE altigis la voĉon kaj diris malrapide *unu vorton post la alia.*) Sed la moderna stato estas nemorala, nereligia; ĝi estas neŭtra. Almenaŭ havas ni la rajton postuli, ke ĝi ne malhelpu la moralon kaj la religion kaj ke ĝi ne permesu, ke oni dissemu en la junajn animojn, kiujn ĝi devas eduki, „des ferments lamentables”.”

Ne estos eble priskribi la aplaŭdon entuziasman de la tuta ĉe-estantaro post tiuj ĉi rimarkindaj vortoj de S-ro Lépine.

(Laŭ la notoj stenografiaj de la Brusela gazeto „XX-ième Siècle”. — Mi skribis Esperante al S-ro Lépine, petante lin, diri al mi sincere, ĉu mi *tute akurate* ripetis liajn vortojn. Mi ricevis jesan respon- don; la sekretario de M. Lépine skribis: „M. Lépine me charge de vous faire connaître, que vous avez *exactement* noté les termes de son allocution”).

A. R.

Katolika Vivo Ĉiulanda.

Nova eparĥio grekokatolika en Hungarlando.

La estontan kunlaboradon al E. K. mi intencis komenci per priskribo de la katolikaĵaro de Hungarujo, kaj precipe per konatigo pri stato de l' orienta Eklezio en nia bela „Mariana regno”.

Malmulte da tempo kaj multe da okupadoj devigis ĉiam kaj ĉiam prokrasti la belan planon. Tamen mi ne estus inda nomata esti „hungaro”, kaj „grekokatoliko”, se nun mi ne klopodus sciigi al mia katolika frataro la ĝoj-egon, kiun havas ĉe ni ĉiuj, ne nur grekoj, ne nur latinoj laŭ rito, sed ankaŭ ĉiuj alireligianoj.

Lia Papa Moŝto bulon eldonis, datatan de 8-a de julio, kiu plenumas la varmegan deziron de l' hungarlingva grekokatolikaro: Lia Sankteco *Pio X*, kaj Lia apostolreĝa Moŝto *Francisko Jozefo I*, fondis novan eparĥion por la grekokatolikaro en Hungarlando. La bulo „*Christifideles Graeci*” anoncas la ĝojigan fakton de la longepetadita episkopeco de *Haidudorog*.

Antaŭ ol la hungaroj okupis sian nunan landon, tiu teritorio estis loĝita de slavaj gentoj, kiuj estis konvertigitaj al Krista Religio. Sankta *Metodo* kun sia frato S. *Cirilo* faris la grandan laboron. La hungaroj, ekkonis, eĉ kelkaj akceptis la Kristanecon tuj post sia enlogiĝado. Ĉar la slavo- konvertitaj de l' ĉefepiskopo de *Panonujo* (teritorio inter la *Danubo* kaj *Savo*) estis nepre grekorit-

anoj, kompreneble ankaŭ la unuaj konvertituloj inter la hungaroj iĝis same anoj de l' orienta Eklezio, kiu estis ankoraŭ ne skizmiĝita. Du hungaraj gentestroj *Bulĉu* kaj *Djula* (skr. *Bulkon* k. *Gyula*) akceptis la bapton en *Konstantinopolo*, kaj venigis orientajn pastrojn en Hungarujon, el inter kiuj *Hieroteo* estis ordigita kiel "episkopo de Hungarlando".

Pastroj de okcidenta Eklezio venis nur je tri jardekoj pli poste. Kiam S. *Stefano*, la unua reĝo de Hungarujo, estis organizanta la katolikan Eklezion en sia lando, krom la novfonditaj latinaj eparĥioj troviĝis jam ekzistantaj grekaj eparĥioj, eĉ mem la sankta reĝo fondis monaĥinejon ankaŭ por grekoritanaj monaĥinoj proksime de la nuna episkopa urbo *Veszprem*. (elp. *Vesprem*.)

Kio okazis al la greka Eklezio en Hungarujo pli poste, oni scias pri tiu afero tro malmulte.

Dume okazis la skizmiĝo de orienta Eklezio (M. Ceruleara); la reĝoj pli favoris la latinajn ritanojn, ĉar la politiko tiel postulis, kaj ĉar la hungaroj mem pli amis la okcidentan Eklezion, kiu donis pli da garantio, ke la lando povu plifortiĝi kaj progresadi.

La orienta Eklezio do vivis tutsilente. La Rumanoj inter montaroj de *Transilvanujo*, kiel loĝantaj pliproksime al sudo, fariĝis kune kun la sudo skizmanoj. Ĉu la aliaj grekoritanoj ankaŭ fariĝis skizmanoj? — estas dube.

La malmultaj troveblaj postsignoj montras, ke ili ne partoprenis en la vivo de katolikaro, tamen verŝajne ili ne estis en skizmo malkaŝita, ĉar oni havas sciigojn, ke latinoj kaj grekoj uzis ofte la saman preĝejon, kio estus neeble, se la grekaro vivinta estus en skizmo.

Ĉirkaŭ fino de la mezepoko la hungaroj estas preskaŭ senescepte latinritanoj. Sole la orientaj departementoj, *Bihar*, *Hajdu* k. t. p. havas iom da loĝantaro grekoritana, kaj la t. n. *Verĥovino*, la novorientaj departementoj, sed tiuj ne estis hungarlingvaj, sed t. n. rutenoj aŭ malgrandrusoj. Suverenoj de Transilvanujo ofte penadis malkonvertigi la grekoritanojn, sed la proponita protestanta religio ne estis akceptita, eĉ por dokumenti sian ortodoksecon

katolikan, en jaro 1646 en la nuna episkopurbo *Ungvár* 400 pastroj kaj multaj el la kredantularo kunvenon havis sub prezidinteco de *Petro Partenio*, monaĥo de ordeno S. Basilio Jr. kaj *deklaris sian apartenecon kaj fidelecon al la katolika Eklezio*. Ĉi tiu deklaro okazis ne tial, kva-zaŭ ili estus vivintaj antaŭe en skizmo, sed por elmontri, *ke ili ne volas aliĝi al la protestanta Eklezio*.

Post multaj penadoj ankaŭ parto de Rumanoj Hungarlandanaj decidis reunuiĝi kun la katolika Eklezio.

Komence por la „rutenoj” (al kiuj oni aranĝis ankaŭ la hungarlingvajn anojn de l’ orienta rito) estis fondita episkopejo en *Munkács* (Munkaĉ), kiu estis pli poste transigita en *Ungvár*-on; la Rumanoj havis sian episkopon en *Fogaraș*.

De post la solena deklarita reunuiĝo la greka rito iom post iom plifortiĝis kaj pli floregis. Tamen la hungarlingvaj grekokatolikoj sentis malutilon de sia rito, ĉar la decidita kaj ordonita lingvo de diservo estis ĉu la elmortinta *malnovslavo*, ĉu la viva rumana lingvo, kiun ili ne komprenis.

Pastroj kaj kantistoj povis nur je grandega laboro fari, ke la hungarlingvaj grekoritanoj ne malkonvertiĝu, kaj ne protestantiĝu. Por plifaciligi la komprenon de la diservo, la pastroj tradukis la meson kaj komencis kantadi *hungare*. La unua mestrado, kiun oni konas, verkita estis en 1795 de P-ro *Georgo Kricsfalussy* (elp. Kriĉfaluŝŝi).

La hungara kantado de l’ meso fariĝis kutimo. La episkopoj aŭ ne sciis, aŭ silente aprobis la kutimon. El la historio oni konis, kiel malfacile estis al S. Cirilo kaj Metodo ricevi permeson al la slava liturgio; iom estis plikomforte ne porti la aferon antaŭ la S. Seĝo.

Kial do devis oni fari liturgion hungarlingvan por malhelpi la protestantiĝon de la grekokatolikaro? Ja la latino-katolikaro same ne komprenas la lingvon liturgian?

La kialon oni trovas en la kiaeco de la ritoj.

La latina pastro iras al la altaro, kaj komencas la meson mallaŭte: „Introibo ad altare Dei”. La elinstruita ministranto respondas: „Ad Deum qui laetificat juventutem meam”, k.t.p. pastro kaj ministranto plenumas siajn taskojn

mallaŭte, dume la ĥoro kantas meskantojn *nacilingve*; nur la komenco de l' anĝela himno: „Gloria in excelsis Deo” la preĝo tiunsekvanta, la leciono s., evangelio, komenco de l' „Credo”, la „Praefatio”, „Pater noster”, „postcomunionio” kaj „Ite, missa est!” estas kantataj. Ĉiuj-ĉi ne trolacigas la atenton de l' aŭskultantoj, kiuj povas ankaŭ ripozi dum la intere kantataj nacilingvaj himnoj.

Tute alie en la orienta rito. Meso de S. *Johano Orlipulo* (Chrysostomo) konsistas el *kontinuaĵ interrespondadoj de la sacerdoto kaj popolo*. La kantoj, kiujn la popolo kantas ne estas nur aldonoj, sed *organikaj partoj de S. meso*. La orienta rito ne konas meson legatan, sole *kantatan*, Ne predo la popolo devas kompreni, kion la sacerdoto kantis, por respondi al li la konvenantan kanton aŭ responsorion. Krom tiuj la meso grekorita estas multe pli longa ol la latina, kaj atenti tekston fremdlingvan dum 2 horoj sen kompreno estas sen spirita utileco, kaj ne kontentiga al la animo piema.

Ĉu oni faris ĝuste, kiam la kutimon de nacilingva diservo oni fondis sen permeso de la apostola seĝo? Tute ne! Sed la proverbo „Suprema lex salus animarum!” povas ilin iom senkulpigi. Nune jam ekzistis kutimo neŝanĝebla.

La grekokatolikaj hungaroj penadis multe, por laŭlegigi la kutimon. Ĉiam kaj ĉiam fariĝis malhelpaĵoj. Fine la malhelpojn forigis la favoro de apostolreĝo kaj papo.

„Christifideles Graeci” hungarlingvaj havas baldaŭ apartan eparĥion. La episkopa residejo konstruiĝos en *Hajdu-dorog*, urbo tuthungara, kaj preskaŭ tute orient-ritana katolika.

El teritorio de diversaj eparĥioj: *Eperjeŝ*, *Munkacs*, *Szamosujvár* (Samosujvar) *Nagyvárad* (Najvarad) kaj *Balazsfalva* (Balaĵfalva) estas elprenitaj 120 paroĥoj, kiuj formas la novan *hungaran eparĥion*.

La nova eparĥio forigas la Julian kalendaron, kaj uzos la Gregorian, forigas el la liturgio la malnovslavan kaj rumanan lingvon, kaj uzos en la plej sanktaj partoj de la meso kaj en preĝoj de sacerdoto mallaŭte legotaj la *palacogrekan*, en aliaj partoj de meso, kaj en aliaj cerimonioj la nacian lingvon.

Jen, la apostola Seĝo elmontris sian prizorgemecon kaj amon al la „christifideles Graeci”. Jen, estos pruvita, ke neniŭ laŭrajta kaj inda deziro restas en Romo neplenumita.

Jen ekzemplo, ke nacieco kaj katolikeco povas esti en la plej bela harmonio.

La hungara „*nacia Eklezio*”, la katolikaro ĝojas, ke la apostola Seĝo sukcesis pliforte aligi, kaj pliproksimigi al si la koron de unu „kristofidela” nacio, kaj plifirmigi ĝin en la aneco de l’ *universala Eklezio*.

Kaj ambaŭ-ĉi pravas. En lingvo kaj sento la nova eparĥio estos vere *nacia*, en kredo kaj „kristofideleco” vere *katolika!*

La hungara registaro donos al la episkopo de l’ nova eparĥio 40.000 koronojn (ĉ. 16000 Sm.) po jare, krom tio la registaro pagos ankaŭ la elspezojn de la fondota pastra seminario, administracio k.t.p.

Efektive, se la Roma apostola Seĝo estos tiel amoplena al la grekaritanaro ankaŭ en la estonteco, ne daŭros tro longe, ĝis kiam efektiviĝos la krista devizo „Unu ŝafejo kaj unu paŝtato”.

Tiaj fortoj estas plej efektivplenaj por regajni korojn de de l’ skizmanoj, kaj revenigi ilin al la apostolestra seĝo.

„Vin, ho Dio, ni laŭdas!”

JOHANO KOZMA,
Mezözombor, (Zemplén-m.)
Hungarujo.

Viatiko tra Aeroj.

Taĉmento longa kaj maldika etendiĝas sur la vojo de l’ deserto. Foririntaj el „Laghouat” la antaŭhieran tagon, pafistoj, spahioj kaj soldatoj de militveturilaro vojiras tra malgaja regiono de l’ „Chebka” al senakvaj landlimoj de „Sahara”. Subite antaŭmarŝantoj rapide returnen iras al taĉmento kriante: „Jen estas kontraŭbatalantoj”. Estas trupo de Tuaregoj, kiu proksimiĝas Estas pli

da du miloj; Francanoj estas nur kvin centoj! Tute egale! Unu po kvar, estas egala batalo por francaj soldatoj de l' Afriko. Komandanto LARGEST, kiu direktas taĉmenton, donas rapidan komandon. Pafistoj disvastiĝas, spahioj levigigas sur siaj piedingoj . . . kaj antaŭen! Dum malmulte da tempo, Tuaregoj sabritaj kaj detruitaj forkuras ĉien, kaj malaperas en nubo de polvo kaj sablo. Francanoj havas venkon, sed ĝi multekostis al ili!

Komandanto LARGEST, la brusto vundita per kuglo, estas falinta teren. Rapide oni starigas tendon kaj la kuraĝa oficiro estas kuŝita sur sia kamplito. Ĥirurgiisto sondas vundon kaj senespere skuas sian kapon.

— Majoro, diras al li komandanto, diru al mi veron . . . mi estas mortanta, ĉe ne?

— Tion mi timas, komandanto.

— Kiom da tempo, mi povas ankoraŭ vivi? Parolu, mi tion ordonas al vi.

— Tri horojn . . . kvar verŝajne, mia komandanto.

Oficiro puŝas sopiron. „Morti estas nenio . . . li murmuris. Sed morti sen pastro, sen helpoj de la religio . . . ho! kiom tio ĉagrena estas!”

Leŭtenanto BRÉGARD aŭdis . . . Estas oficiro aviadisto rimarkinda, kiu tuj akiris sian ateston de piloto, kaj kiu akompanas taĉmenton kun unuplano celanta por fari esplorojn en la dezerto. La „Blériot” estas tie, sur unu ŝarĝveturilo, kiun kondukas soldatoj de militveturilaro.

— Mia komandanto, li ekdiras, se vi komandus al mi, mi povas trovi pastron por vi.

— Sed kie, mia amiko? respondas malforte la vundito.

— En „Laghouat”, mia komandanto . . . vento, plej eta brizo ne estas . . . mia aeroplano rapida estas, kaj, antaŭ tri horoj, mi alkondukas pastron, kondiĉe, ke li havas kuraĝon akompani min.

Rapidega ĝojo radiigas vizaĝon de LARGEST, kiu premis manon de Leŭtenanto kaj al li diras: „Dankon! bravulo vi estas . . . iru!”

Leŭtenanto BRÉGARD kurante ekrapidas ekster tendo. Soldatoj de militveturilaro rapide faris pretigojn . . .

La unuplano tie estas disetendante siajn blankajn flugilojn sur la blankeco de l' sablo. Leŭtenanto sidiĝas sur sia seĝo . . . meĥanikisto funkciigas helicon motoro bruadas . . . kaj leŭtenanto BRÉGARD rapide altiĝas en aerojn, rekte al nordo direktas . . . Estas proksimume tri horoj vespere. Al la kvina horo, post esti transirita per senprudenta rapideco pli ol du centojn da kilometroj, la brava aviadisto alteriĝas ĉe aerodromo de „Laghouat”.

Konfidante sian aparaton al kelkaj soldatoj, leŭtenanto BRÉGARD kuras al hospitalo, kie li estas certa trovi pastron, la P. ANDRAL. Li renkontas lin sur la sojlo de la kapelo.

— Mia patro, li spireganta ekdiras, ĉu vi bonvolas enveturiĝi kun mi en aeroplano?

La bravula pastro konsideras lin kiel frenezulo . . . Li respondas :

— En aeroplano . . . al tiu horo . . . kial?

Leŭtenanto rapide informas lin pri malfeliĉa sciigo.

— Mi estas via, respondas P. ANDRAL . . . momenton, por preni mian surplizon, sanktajn oleojn kaj sanktan viatikon!

Dek minutojn poste li estas ĉe aerodromo, apude la leŭtenanto . . . Granda popolamaso amasiĝas ĉirkaŭ bariloj por ĉeesti al tiu suprenirado, ankoraŭ unika en aviadaj analoj.

Kuraĝege la brava pastro sidiĝas apud oficiro . . . Unuplano supreniras kaj rapide malaperas en la horizonto, en la glora purpuro de l' vespero. La pastro enpensigante, pie premas kontraŭ sia brusto la malgrandan skatolon arĝentumitan, kiu enhavas la sanktan hostion. Kaj por la unua fojo, Dio de Eŭkaristio vojaĝas, portata per malpezaj flugiloj de aeroplano, je mil metroj super la dezerto, al la malproksima soleco, kie mortanto atendas Lin. La suno kuŝiĝanta metas aŭreolon de lumo ĉirkaŭ la malforta birdo, kies flugiloj tremetas kaj vibras per vento de helico Leŭtenanto BRÉGARD, dum li direktas aparaton, preĝas fervore kaj petas Dion, por ke li alvenu ĝustatempe. Aeroplano rapidege trairas la aeron kun mira obeemeco . . . ĝi ŝpinas kiel sago. Subite, aperas vicaro da tendoj, lumigataj per lastaj lumetoj de l' tago . . . kaj aeroplano

malrapide alteriĝas apud la eniro de l' kampo, meze de aplaŭdoj kaj akklamadoj de la soldataro.

Pastro, multe kortuŝata, malsupreniras de sia aera seĝo kaj penetras sub la tendo de l' vundito. Komandanto ankoraŭ vivas, kiel galvanizata per supernatura espero; sed oni sentas, ke li estas al sia morta horo.

— Dankon, mia Dio! li murmuris, kiam pastro aperas.

— Jes, danku Dion, diras al li P. ANDRAL, danku la Dian Majstron, kiu venas al vi el malproksimeco, por al vi doni sian lastan kison. Kaj pastro kliniĝas je kuŝejo de la mortiĝanto; li aŭdas lian lastan konfeson kaj en lia buŝo metas sanktan histion, viatikon de amo, kiu akompanas homon ĉe la komenco de l' eterneco.

Komandanto mortas dum ekstere flugiloj de l' aeroplano, ankoraŭ tremantaj de la freneza kurado, metas du vastajn blankajn makulojn sur la unuaj ombroj de l' nokto.

Max ROUB.

(Laŭ „Le Sonneur d'Albi”.)

Kroniko de I. K. U. E.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista.

Merkredon, la 11. IX., je la oka vespere okazis prediko esperanta, la unua en Vieno. La predikanto estis lia moŝto D-ro Giesswein. Li pritraktis la plej sanktan Eŭkaristion, donantan al la mondo vivon kaj lumon, kvankam la mondo senpenseme ne ŝatas tiujn donacojn. La nordlandanoj ekzemple tre ĝoje salutas post multsemajna senlumo la al-sopiritan sunon nur dum kelkaj minutoj aperantan. Tiamaniere certe ankaŭ la malvarmkoraj homoj salutis la vivigantan kaj lumigantan eternan sunon, Jezuon Kriston en la plej sankta Eŭkaristio, se tiu gracfonto dum kelka tempo tute fermiĝus. — La kriptoj, en kiu okazis la prediko, tute estis plena je aŭskultantoj.

Post la diservo oni iris en proksima gastejo por ĉeesti

la starigon de nia A. K. L. E. Bedaŭrinde multaj homoj ne povis partopreni ĉar mankas sufiĉa spaco. S-ro redaktoro SCHRÖDER motivis la starigon de nia unuiĝo kaj lia moŝto D-ro GIESSWEIN entuziasmigis per mallonga parolado la ĉeestantojn. Post la antaŭlego de la regularo oni faris tiun-ĉi proponon por elekto de unuiĝestraro, kiu ankaŭ estis akceptata: prezidanto Johano SCHRÖDER, redaktoro; substituanto Bernhard ULM; sekretario Jozefo HÖRL, instruisto; substituanto J. MITTERHAUSER; kasisto Karlo WESELY; subst. Mav FÜHRING, instruisto; konsilantoj: Johano AIGNER, sekretaristo; Henriko KELLNER, instruisto.

La kotizo estas 1 K 20 h, tio estas 10 h monate. Oni bonvolu la kotizon por la tuta jaro sendi al kasisto Karlo WESELY, IX., Pulverturm. 15, plej bone per letermarkoj, ĉar pagformularojn ni ne havas ankoraŭ pro monmanko. Samkaŭze ni ankaŭ ne alsendos por pagitaj kotizoj kvitancon, sed enpresos la nomojn de pagintaj membroj en „Espero Katolika”, kiun gazeton ĉiu katolika esperantisto devas aboni.

Ĉar la indiferentaj unuiĝoj ĝis nun ne laboris sufiĉe por nia kara lingvo kaj multaj katolikoj ankaŭ antaŭjuĝe Esperanton konsideris kiel nura izraelida aŭ framasona afero, *tial estis starigata A. K. L. E., ne kiel kontraŭulo, sed kiel helpulo, por ke nia lingvo foje ankaŭ inter katolikoj faru progresojn.* Ni volas kun ĉiuj esperantistoj labori por disvastiĝo de esperanta lingvo kaj nenian malpacon enporti en esperantujo laŭ intenco de nia majstro Zamenhof. (Sed se antaŭreligiuloj estus batalantaj kontraŭ eklezio, tiam ni ankaŭ bezonas pretan militistaron por rebati iliajn atakojn.) Por ke per unuigitaj fortoj kiel eble plej multe laborata estu koncerne la disvastiĝo de Esperanto, estis starigata la A. K. L. E. Ĉiu katolika esperantisto bonvolu do baldaŭ ensendi sian kotizon (1 K. 20 h.), kiel oferdonon por helpo al tiu celo, kvankam oni por tiu sumo nenion ricevos, eĉ ne moderigitan abonprezon.¹⁾ Ni bezonas kaj bezonos monon por propagando, kaj ĉiu komenco estas malfacila. Post unu jaro ni certe havos multajn centojn da membroj kaj tiam ni ankaŭ al niaj kunhelpantaj

fondantoj povos doni malaltigitan abonprezon. Bonvolu do ankaŭ ĉiu katolika esperantisto krom tio aboni la „Esperon Katolikan” (por tuta jaro 4 K. 80 h.) kaj la tutan abonmonon ĝis la 15 decembro 1912 sendi Vienon IX., Pulverturmĝ. 15, ne Nederlandon (por faciligo de administtr. laboroj).

Fine bonvolu ĉiu helpi membrojn gajni kaj novajn esperantistojn per kursoj. Kelkaj jam kondukas kursojn, kvankam ili mem ne konas Esperanton, sed, „docendo discitur” (per instrui oni mem lernas).

Bonvolu multaj sekvi tiun ekzemplon!

Jozef HÖRL.

Propagandkunveno en Amsterdam.

Estis la 25an de Septembro vespere. Sur la kanalo nomita „de la sinjoroj” multaj personoj estis viditaj, ĉiuj rapidiĝantaj al domo, kies pordo portas la surskribon: „Kredo kaj Scienco”. En tiu domo, dediĉata de la Pastroj Jezuitoj al la uzado de la Katolikaj studentoj de Amsterdamo, la salono de la unua etaĝo estis brilante lumiĝata. Fraŭlinoj, feste vestataj en helaj vestaĵoj, sinjoroj en nigraj surtutoj baldaŭ plenigis tiun salonon, kaj donis al la kunveno mienon de gaja festo. Pro kio ili estas kunvenintaj? Kio estas okazonta? La verda flago, ornamata de blanka kvinpinta stelo, kiu sin montris alte super la seĝegoj de la estraro, donis la respondon. Estis festa kaj propaganda kunveno de la Esperantista unuiĝo de Amsterdamo, kies nomo: „Nia Kredo” montras sufiĉe, ke ne nur Esperanto, sed ankaŭ Katolikismo unuigas la membrojn, kiuj per tiu festo volis rememori la 25 jaran naskiĝtagon de la Esperanta lingvo. Du eminentaj parolontoj estis invititaj por konvinki per siaj elokventaj vortoj la ĉeestantajjn ne-esperantistojn pri la utileco kaj la neceseco de Esperanto, kaj de Katolika Esperantismo. La prezidanto de „Nia Kredo”, S-ro Petro

¹⁾ Ni rimarkigas, ke oni povas *kolektive* aboni E. K. Por informoj sin turni al la administranto de E. K., S-ro SLEIJFFERS.

JANSSEN, malfermis la kunsidon per la Kristana saluto „Laŭdata estu Jesu Kristo!” kaj post tio legis leteron de la ĉefredaktoro de Nederlanda Katoliko D-ro SMULDERS, sendita al la estraro por atesti lian simpation.

Poste ĥoro de gesinjoroj kantis la belan himnon Katolikan kaj per tio donis al la ne-esperantistoj ideon pri la belsoneco de nia kara lingvo. Tiam la prezidanto donis la parolon al Profesoro LINNENBANK el Uden. Antaŭ ol komenci sian paroladon pri Esperanto, konsiderata gramatike kaj societe, la parolanto volis refuti kelkajn malprecizajn komunikaĵojn, kiuj ja per la Katolika presaro estis dissemitaj pri Esperanto en la gazetaro. Oni estis parolinta pri Esperanto kiel pri sekreta religia societo, posedanta Papon = D-ro ZAMENHOFF, konciliojn, biblion = Fundamento, kaj misteran ĵuron. Li klarigis, ke de ĉio tio ĉi nenio estas vera. Nia unuiĝo, li deklaris ripete, estas aprobita reĝine kaj episkope kaj li insiste petis, ke la katolika presaro do apogu nian movadon, kiu povas fariĝi benegaĵo por la tuta mondo. Post tio Profesoro L. montris per nombro da ekzemploj la simplecon de Esperanto. Ankaŭ li rakontis tre sprite kaj interesige siajn impresojn dum „Nia Dua” en la Hago kaj li kvazaŭ prezentis al la ĉeestantoj la diverslandulojn, kiuj ĉiuj tre facile estis komprenataj en la ununura lingvo: Esperanto. Li finis sian antuziasme aplaŭdita paroladon per la tuŝante bela novjarosaluto de Albrecht Rodenbach al liaj kunuloj en la batalado por la flandra lingvo. Kiel ilia devizo, la nia devas esti: „Antaŭen”.

Post kiam la ĥoro estis kantinta trivoĉe la kanton: La Tagiĝo, la multnombraj ĉeestantoj iris al la salono de la dua etaĝo, kie estis aranĝita belegan ekzpozicion de Esperantaj gazetoj, libroj kaj propagandiloj. Tio ekscitis grandan intereson, kaj baldaŭ la fervoraj membroj de Nia Kredo cirkuliĝis inter la gastoj por demandi al ĉiuj, ĉu ili volas fariĝi membroj. Baldaŭ longa listo portis multajn nomojn.

Post la paŭzo fraŭlino K. kantis kelkajn ĉarmajn kantojn flandrajn kaj ŝi estis tre aplaŭdita. Nun Pastro L. POEL el Tilburg komencis sian paroladon pri Katolika Esperan-

tismo. Li montris, ke eĉ la Esperanta Stelo ne estas kapabla estingi la malamon de la artiklerikuloj. En Antverpeno li ĉeestis La Sepan kaj tie li eksperimentis, ke, kvankam li portis la verdan stelon tre videbla sur sia eklezia vesto, tio ne malhelpis la alipensantojn sin forturni de li. La parolanto rakontis, ke li estis incitita por fariĝi Esperantisto per la multnombraj socialistaj broŝuroj verkitaj esperante, kiuj estis dissemitaj inter la laboristoj. La nekatojikaj laboristoj jam havas siajn internaciajn unuiĝojn; kial la Katolikoj restus ĉiam malantaŭe aŭ venus tro malfrue? Ankaŭ li klarigis la utilecon de Rom-Katolika Esperantismo por la pacomovado, la protektado de junulinoj, la elmigrado, k. t. p. Fine li instigis forte la ĉeestantojn fariĝi membroj aŭ favorantoj de la unuiĝo kaj per tio apogi la Rom-Katolikan Esperantistan movadon.

Post tio la ĥoro kantis la batalhimnon Esperantistan; tiuj kantoj ŝajne tre plaĉis al la konvenintaj kaj ĉiufoje laŭta aplaŭdo rekompensis la gekantintojn. En sia fermo-parolado la prezidanto oferis ankaŭ sian koran dankon al ĉiuj, kiuj estis kunlaborintaj al la sukcesego de ĉi tiu propagandkunveno, sed kvankam per tio la oficiala parto de la vespero estis fermita, multaj gesinjoroj kaj certe ĉiuj geesperantistoj ne povis tuj foriri. Oni formetis la seĝojn kaj la gejunuloj invitataj per gaja muziko baldaŭ estis dancantaj. Junularo ĉiam kaj ĉie estas la sama: kvankam ili plaĉe estis aŭskultintaj seriozan paroladon, tiu ĉi finiĝo de la vespero premiis la tuton kaj faris la Esperantan feston neforgesebla. X.

Oficialaj Sciigoj.

Pri I. K. U. E.

Diverslandaj katolikaj samideanoj petas min, ke mi sciigu ilin, kiamaniere ili povas aliĝi al I. K. U. E.

Ĉar sufiĉe multaj forgesis aldoni respondkuponon, kaj despli, ĉar laŭ deziresprimo de „Nia Tria” en Budapest nepre estas dezirinde, ke ĉiu, kiu deziras aliĝi al I. K. U. E.

ankaŭ legu kaj abonu ĝian oficialan organon „Espero Katolika”, mi en ĝi publikigas mian respondon.

Unualoke mi atentigas, ke anoj de I. K. U. E. ne estas personoj privataj, sed nur regionaj kluboj, landaj unuiĝoj, aŭ naciaj ligoj.

Kiam do iu privatulo deziras aliĝi al I. K. U. E., li komencu unuiĝi minimume 20 esperantistojn katolikajn, kiuj, tiel unuiĝitaj, povos aliĝi al I. K. U. E. — almenaŭ se en sia lando ne ekzistas katolika ligo esperantista, aliĝinta al I. K. U. E. — paginte po-membran kotizon ĉiujaran da Sm. 0.10, do por 20 membroj Sm. 2.— poĵare, kaj sendinte antaŭe ĝian klubregularon, por ke la Estraro de I.K.U.E. ekzamenu, ĉu ĝia enhavo ne kontraŭstaras la regularon de I. K. U. E. — Rekomendinde estas ankaŭ, ke la diocesa Episkopo aŭ landa Episkoparo antaŭe aprobu la regularon. — Okaze, ke en la lando, kiun loĝas la starigitaj aŭ starigotaj kluboj, kiuj deziras aliĝi al I. K. U. E., jam ekzistas unuiĝo aŭ ligo nacia, aliĝinta al I. K. U. E., tiuj kluboj plej regule povos aliĝi al I. K. U. E., pere de tiu landa aŭ nacia ligo.

* * *

Oni permesu al mi eldiri tie-ĉi, ke laŭ mia konvinko la maniero, je kiu niaj nederlandaj samreligianoj esperantistaj aranĝis sian organizon, estas *modela*.

Konforme al la *regularo de I. K. U. E.* verkita dum, kaj aprobita de „Nia Unua” en Parizo, kies *art. 3a* ordonas: **Starigi naciajn kaj regionajn katolikajn Esperantistajn Ligojn en diversaj landoj**, — la nederlandaj samcelanoj sub la nomo: „Nederlanda Katoliko” starigis **Katolikan Ligon Esperantistan**, kies anoj estas katolikaj, Episkope aprobitaj, unuiĝoj Esperantistaj.

„Personoj, kiuj ne estas anoj de iu loka unuiĝo katolik-esperantista, sed apogas la Ligon per laŭstatuta kontribucio, estas favorantoj.

Ĉiujare la lokaj unuiĝoj elektas el siaj anoj po unu estrarmembron, kiuj kune konsistigas la Ligestraron.

„Tiu Ligestraro ĉiujare elektas ĉefan aŭ tagan Estraron, konsistanta el 7 personoj, nome: prezidanto,

vicprezidanto, sekretario, helpsekretario, kasisto kaj du membroj sen antaŭfiksita ofico.

Ĉiu ano aŭ favoranto de iu aliĝinta loka unuiĝo estas elektebla kiel membro de la Taga Estraro”.

* *
* *

Ĉar rilate al I. K. U. E. „Nia Tria” en Budapest, rememoriginte, **ke estas nepra devo por ĉiu nacia sekcio de I. K. U. E. akurate pagi la fiksitajn kotizaĵojn**, decidis:

1e. Ke tiu pago devas komenci kun la jaro 1911 por la tiam ekzistintaj sekcioj.

2e. Ke nur la unuiĝoj aŭ ligoj, kiuj ĝustatempe pagis la jaran kotizon, estos rigardataj kiel membroj de I. K. U. E.; pro tio mi afable sed insiste petas la estimatajn sekretariojn de niaj diverslandaj sekcioj, ke ili kiel eble plej baldaŭ **havigu al mi la nombron de siaj anoj dum la jaro 1911 kaj dum 1912 aldonante la ŝulditajn kotizojn**, kies saldo estos sendata al la ĉekbanko de nia samideano Ĉefeĉ en Londono.

Tuj kiam la konstanta kongres-sekretario, S-ro COLAS; estos pretiginta sian Oficialan Raporton, mi pli detale sciigos la gelegantaron de Espero Katolika pri la I.K.U.E.-diskutoj kaj decidoj dum „Nia Tria”, jam nun alvokante la bonvolan kunhelpon de ĉiuj niaj samcelanoj por florigi nian Mondligon.

Tilburg (Nederlando).

FRANS KNAAPEN,
Sokr. ĝen. de I. K. U. E.

AL LA ABONANTOJ DE „E. K.”

Dankante la pagintojn pro la alsendo de la abonmono, mi havas la plezuron publikigi iliajn nomojn, (vidu la kovrilon). Samtempe insistege mi petas la jenon:

Havu la afablecon sendi aŭ sendigi la abonmonon rekte al mi, la Administranto.

Klarigo: Estas du oficoj; la unua, tiu de la Redaktoro, kiu sin okupas pri la *enhavo* de nia Revuo. Alsendu al li artikolojn, korespondu kun li pri la enmeto, traduko k. t. p. de artikoloj.

La dua ofico estas tiu de la Administranto, kiu sin okupas ekskluzive pri la ekspedo, librotenado, pagado, abonmono. Por eviti al Vi mem prokraston ĉiam-neagrablan, por eviti al ni nenecesan

laboron, bonvolu ne intermiksi tiujn du oficojn; do turnu Vin al la Redaktoro nur pri artikoloj, al subskribinto nur pri mendoj, pagadoj, (eventuale : plendoj).

Ĉi tiu lasta vorto enkondukas mian duan peton:

Ĉiam skribu Viajn nomon kaj adreson plej legeble!

Jam kelkafoje okazis, ke mi, kiu ofte kaj multe korespondas, tamen *ne* povis deĉifri la subskribojn. Ne forgesu ekzemple, ke ofte mi ne ricevas la *originalajn* poŝtmandatojn, ke la poŝt-oficistoj de diversaj ŝtatoj ilin transskribas. Sekve: kiam Vi skribas ne-tre-legeble, la oficistoj penadas „deĉifri”, ili klopodas ne *transskribi*, sed *desegni* „litero post litero” vian adreson, kaj mi ricevas fine, jes, ion, kion mi devas montri al diversaj „spertuloj” por envoki ilian intuitivon (divenemon).

Plie: *Ne* esperanten traduku Viajn nomon, straton, landon.

Estas vere, baldaŭ ni esperas atingi tiun feliĉan rezultaton, ke ĉiuj poŝt-oficistoj scios, estos studintaj „nian karan lingvon”.

Sed . . . (tiu malagraba „sed”!) ĝis nun diversaj el ili ne scias Esperanton, kaj nevole, kontraŭvole, ili ne komprenas la adresojn de Vi al mi havigitaj, kaj . . . la E. K.-numeroj ne- aŭ ne-ĝustatempe venas en vian posedon.

Por fini mian artikoleon:

Multaj bonvolis plenumi mian insistan peton de „Julio 1912”.

Sed . . . tiom multaj ankoraŭ ne pagis!!

Mi ree devas atentigi, ke la abonmono estas antaŭpagota.

„E. K.” fariĝis grava „Akcia Societo”.

Mi, kiel ĝia administranta, ne rajtas agi laŭ propra gusto; mi devas obei la de la Komisar'aro ordonojn, donitaj en la intereso de „E. K.”, por ĝia prospero. Ne rajtas mi ludi belan rolon (cetere tiom facilan?): pagu *se* aŭ *kiam* Vi volos. Ne!

„E. K.” liveras sian monatan revuon aŭ frankite, „E. K.” rajtas fari siajn kondiĉojn. Unu el ili estas: „Se Vi deziras ricevas la revuon, pagu antaŭe”. Plie:

Ne forgesu, ke niaj idealoj ne estas efektivegeblaj, se ni ne disponas pri la „nervus rerum”, t. e. la nepre bezonata mono! — Punctum. (Sufiĉas.)

En la venonta numero mi daŭrigos sur la kovrilo la liston de la jam nun pagintoj kaj de la pagontoj.

Sincere Via,

La Administranto,

F. SLEIJEFERS. 93 Prins Hendrikstraat.
Den Haag. Nederlando.

Laro¹⁾ kaj Homo.

Laŭ poezio france verkita de S-ro Cuard.

Limon ne konas la laro fluganta,
 Ĉiam ĝi flugas, flugadas senlace,
 Certe pli blanka ol blankaj neĝeroj
 Kiuj faladas el nigra ĉielo.

Kiam ĝi lasas la spacon profundan
 De la lumega kaj vasta ĉielo,
 Venas ĝi sin balancadi sur l' ondojn
 De la lagetoj aŭ de l' Oceano.

Poste paŝante sur teron la nian,
 Ĝi eĉ en niajn loĝejojn envenas
 Kaj la teranojn kompate rigardas
 Ja malliberajn en domoj malvastaj.

Certe ne flugas la hom' tra l' aero,
 Ĉiam sur tero li devas penadi;
 Sed, ho feliĉo! l' animo Kristana
 En la ĉielo mistere vivadas!

Esperantigis,
 Abato DESRAY.

1) En tiu ĉi poezio oni parolas pri marbirdo, tre konita sur la Oceana marbordo, kiun oni nomas en Francujo „goëland”; la zoologistoj nomas ĝin „Larus”.
